

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ helmikuu ♦ februaro ♦ 1/2004



Nova ĉefredaktoro en intervjuo, p. 4

EU ja kielikysymys, s. 6 ♦ Pietiläinen kandidatas por komitato, p. 9

Talvipäivät ♦ Vintraj Tagoj en Jyväskylä, p. 16

Kesäkurssit ♦ Someraj kursoj en Valamo, p. 14

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef_redakto@tiscali.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhint/Prenumerationspris/Abonprezo: 15 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Synnöve Mynttinen, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326

Jukka Noponen, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎ (09) 1483871 ✉ jukka.noponen@iki.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ tgrundstrom@

www.lailanet.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Officejo/Toimisto: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Ĉu esperantoasocioj plu havas sencon?

Esperantoasocioj estas asocioj, kiuj okupiĝas pri esperanto. Klare, sed ĉu tio plu havas sencon en la nuna mondo? Ĉu sufiĉas individuaj kontaktoj kaj agadoj sen membrokotizoj, jarkunvenoj, agadplanoj kaj agadraportoj? Ja ekzistas la eblecoj informiĝi interrete, kontaktiĝi per reto, en babilejoj kaj eĉ eblas interreta aŭskultado de radio. Se mi bone komprenas jam ekzistas iaspeca esperantlingva televido en interreto ... Ĉu necesas aŭ almenaŭ utilas la asocioj?

Nu, mia respondo ne estos surprizo por vi kaj mi do malkaŝu mian opinion tuj. Asocioj ja havas sencon, sed asocioj same kiel la individuoj devas orientiĝi en nova realaĵo.

Dum la komunikadprojekta trejnseminario ni cerbumis pri la senco de asocioj. Ni konstatis ke asocioj estas bezonataj pro diversaj kaŭzoj, pri kiuj mi nun esprimu kelkajn pensojn.

♦ Asocio kunigas homojn

Asocioj ĉiam kunigas homojn sendepende ĉu temas pri esperantoasocioj aŭ aliaj. Por niaj asocioj aparte grava estas la uzo de la lingvo. Pere de la asocioj kontaktiĝas uzantoj de esperanto inter si. Ja, ne estas tre interese paroli kun si mem. Tamen nuntempe eblas facile trovi aliajn esperantistojn por interkomunikiĝi sen aliĝo al asocioj.

♦ Asocio disdonas informojn kaj disvastigas ideojn

Preskaŭ ĉiuj asocioj havas eksteran celon, ian mision. Povas temi pri interŝanĝo de informoj pri iu fako aŭ realigo de komunaj spertoj, pri ĉefe interna fortiĝo, sed ofte temas ankaŭ pri defendo de ekonomiaj aŭ aliaj interesoj de iu grupo aŭ kreskigo de prestiĝo de iu afero. Ĉiuj aspektoj validas por esperantoasocioj, sed kompreneble eblas informi kaj disvastigi ideojn ankaŭ sen asocioj.

♦ Asocio donas al agado ordon kaj efikecon

Asocio estas ordigita kunestado. Ĝi sistemigas la agadon de homoj, donas efikecon. Pli facilas disdivido de taskoj per ia organizo, ĉu en formo de asocio, ĉu en formo de retlisto, ĉu en alia formo. Ĝenerale utilas strukturo, ia disdivido de taskoj, havigo de roloj, funkcioj, respondecoj. Ekzemple, se mi ne estus prezidanto de EAF mi verŝajne ne verkus ĉi tian kolumnon. Eble mi anstataŭe skribus rezolucion por UEA aŭ, kred-eble, preferus rigardi televidan dramon. Nu, eblas pli bonaj ekzemploj. Speciale mi ĝojas ke ni nun havas ĉefredaktoron.

Legitimeco estas grava rezulto de la organiziteco. Bone funkcia asocio donas kredindecon. Eblas agi nome de pli granda grupo, kiel reprezentanto de asocio. Por neesperantistoj povas esti pli facile kompreni ke ekzistas iu esperantoasocio – ja asocio estas io konata – ol ke ekzistas esperanta idealo aŭ, kvankam pli konkreta, lingvokomunumo. Aliflanke individuoj povas agi ankaŭ propranome tute efike. Ofte ankaŭ en tiaj kazoj la individuo havas ian rektan aŭ nerektan subtenon de asocio, ekz. utiligas informojn kaj kontaktojn provizitajn en la asocia kadro.

♦ Asocio donas ĝuon, servojn kaj ankaŭ monon

Por ke asocio havu sencon ĝi devas havi sencon por siaj membroj, ĉar ja ĝuste la membroj konsistigas ĝin. Gravas la sento de motivo interesiĝi pri la agadoj de la asocio, la sento de ĝuo aŭ alia motiviga faktoro. Sencoplenaj aktivaĵoj kaj ĝenerala sento de fido al la asocio instigas al kunagado.

Gravaj povas esti ankaŭ konkretaj servoj, kiuj ne postulas grandan aktivecon de la membro. ▷25

Mikko Mäkitalo – nova ĉefredaktoro de Esperanta Finnlando

Esperanto-Asocio de Finnlando preskaŭ du jarojn serĉis ĉefredaktoron post Aimo Rantanen – kaj nun la ĉefredaktoro troviĝis. Temas pri Mikko Mäkitalo, persono jam konata al niaj legantoj kiel aktiva esperantisto kaj artikolverkanto. Okaze de lia ĉefredaktoriĝo ni konatiĝu kun li iom pli.

Mikko Mäkitalo naskiĝis la 5an de majo 1972 en la kampara komunumo Koski (antaŭe Koski Tl., sed nun ĝi estas la sola komunumo Koski, ĉar eksa Koski Hl. estas nun Hämeenkoski).

– Tie mi kreskis flegante bovinojn, kurante kun hundo en arbaroj kaj legante astronomiajn librojn.


Astronomio estis lia unua hobo kaj li daŭre rigardas la stelan ĉielon, iam per teleskopo, sed ankaŭ simple starante nokte sur bona loko, rigardante la konstelaciojn kaj sekvante, kiu planedo nun estas en kia situo.

– Min ĉiam interesis ekstudi pri la plej bazaj trajtoj kaj kondiĉoj pri la mondo, en kiu ni ekzistas.

Jam plurajn jarojn li loĝas en Turkuo. Tien li transloĝiĝis de Koski por studi fizikon.

– Komence de la studoj mi planis iĝi astronomo, astronomio ja estas unu sekcio de fiziko, sed en iu fazo mi konstatis, ke mi ne volas detrui bonan hobion per fari ĝin profesio. Do mi ne plu sciis, kion mi volus fari, prenis nur la magistran diplomon (FM).

Mikko aktivas en Turun Ursa, faras prezentadojn de la ĉielo por la publiko kaj alimaniere peras informojn pri astronomio. Ni legantoj konas lian informperadon en la formo de la serio “Sur la nokta ĉielo”.



Esperanto allogis jam infanaĝe

Pri Esperanto Mikko eksciis jam en infanaĝo.

– Mi havis la konatan libron *Antero Vipunen* kun ĝia ekzemplajo pri Esperanto, kaj ankaŭ iun libreton kun titolo *Koululaisen muistikirja* kun iom simila ekzemplajo. El tiuj oni ne vere povis lerni Esperanton, sed almenaŭ ekscii, kio kaj kia lingvo ĝi estas. Estante 20-jara, 1992, mi trovis lernolibron en biblioteko kaj legis ĝin, sed ankoraŭ

tiam ne tre serioze.

Vintre 1995 li pli serioze komencis, denove per bibliotekaj libroj.

– Mi verŝajne tiam aŭdis, ke Universala Kongreso estos en Finnlando en la sama jaro kaj tio instigis min studi.

Li ankoraŭ ne kontaktis aliajn esperantistojn kaj ne partoprenis la UK:n, sed li ja trovis koncerton de nederlanda grupo Kajto kadre de la antaŭkongreso en Turkuo.

– Mi jam plejparte bone komprenis la lingvon kaj mi memoras ilian kanton ”Hodiaŭ mi fruelitiĝis”, kies filozofio bone trafas mian vivstilon

...

Daŭris ankoraŭ jaron ĝis li konatiĝis kun aliaj esperantistoj. Li partoprenis la someran kurson en Jyväskylä 1996.



– Salutojn al tiamaj kunkursanoj Seija, Kari, Allan, Tuula, Sylvia, Jukka, Terhi, Anna-Liisa kaj la norvega Udd kaj la instruisto Stefan McGill kaj ĉiuj, kiujn mi forgesis.

Sekvasomere Mikko partoprenis sian unuan eksterlandan renkontiĝon, la Baltajn Esperanto-Tagojn en Haapsalu 1997. La unua fojo en BET allogis lin al pliaj.

– Mi ŝatas partopreni tiajn renkontiĝojn, kien eblas bicikli.

Mikko plurfoje biciklis tre longajn distancojn, ekz. pasintjare al BET, IJK kaj UK.

– Estas diversaj aspektoj en mia biciklado. Unu ja estas la ekologia turismo. Alia estas, ke mi ekbiciklante prenas iuspecan defion en fizika lerteco, provante, ĉu mi kapablos fari la tutan distancon per mia korpa forto. Ankoraŭ aparta estas nur sperti la solecan sendependecon kaj senzorgecon survoje. Kaj ankaŭ sperti la noktojn en tendo en arbaro.

Mikko partoprenis la Kulturan Esperanto-Festivalon en Helsinko. Ekde tiam nova generacio aktivis en Finnlanda Esperantista Junulara Organizo. Inter la aktivuloj troviĝas ankaŭ Mikko. Verŝajne lia unua kontribuaĵo por Esperanta Finnlando estas la raporto pri la FEJO-semajnfino en Turku decembre 2001. Ĝi aperis en la gazeto 1/2002. Ekde la pastinjara jarkunveno

Mikko estas sekretario de FEJO.

Prigazetaj pensoj

Provante rememori kian unuan impreson Esperanta Finnlando donis al li, Mikko konstatas ke li verŝajne pensis ke ĝi estas unu plia malgranda klubgazeto.

– Klubgazetoj abundas kaj ne tre multe interesas. Tamen baldaŭ vekis respekton, ke la gazeto estas fakte bonstila farata kaj oni eĉ atentis pri la deciditaj datoj de apero, kvankam kelksemajnaj malfruiĝoj povas ja okazi. Por malgranda asocio kiel EAF tio estas bone atingita.

Kiel ĉefredaktoro Mikko celas atingi ke la gazeto aperu pli regule lige al la oficialaj aperdatoj, sed ĝenerale li ne planas gravajn ŝanĝojn ĉar tiom multe jam bone funkcias. Gravus ke la gazeto estas enhance kaj aspekte interesa.

– La gazeto povas esti kvazaŭ montra fenestro de la movado, kiu logas novajn anojn studi kaj praktiki Esperanton, se ĝi havas ion interesan por oferti.

Li volas instigi al pli da kontribuoj pri plej diversaj temoj. Gravus priskriboj de renkontiĝoj, sed ekzistas ankaŭ multo alia interesa.

– Mi esperas artikolojn iom pli pri aferoj ekster la Esperantomovado mem. Krome mi rekomendas rakonti en la gazeto ne tiom, kiu faris kion en kongreso, sed kio ekzistas ekster la kongreso. Mi mem celis tion ekzemple per artikolo pri Fenestrelle en la numero 3/2002, kie mi skribas ne multe pri la IJF mem, sed pri la trajtoj de la vizitita regiono.

Demandite pri siaj sekretaj talentoj Mikko donis respondon, kiu bone ilustras ke eblas pere de esperanto havi tre diversajn spertojn kaj ke estas interese legi pri ili.

– Sekreta talento, eble ĵonglado. Tion mi aplikis kaj praktikis en lastjara IJK, foje pensante, ke la kongreso devus esti nomita ne IJK, sed IĴK por Internacia Ĵonglanta Kongreso. Mi estis ne inter la plej lertaj ĵonglistoj tie, sed eble mi prezentos ion iam en eventoj de EAF.

A M Ritamäki

EU ja kielikysymys

Kirje kaikille suomalaisille europarlamenttiedustajille

Kun monia vuosia sitten Kanadassa Quebecin hallitus alkoi systemaattisesti vaalia ranskan kielien asemaa, monet englanninkieliset protestoivat. Kysyttiin miksi lailla halutaan muuttaa ihmisten käyttäytymistä. Eikö ymmärretä, ettei niinkin intiimiä asiaa kuin kielen käyttöä voida muuttaa lakiteitse? Jos suojellaan ranskankielisiä, miksei suojella englantia puhuvia?

Siitä on nyt useita vuosikymmeniä. Opittiin, että vahvat eivät tarvitse lakeja tuekseen, niitä tarvitsevat heikot turvakseen. Ranskankielen aseman selkeyttänyt laki sai aikaan muun ohella sen, että ranskankielinen kulttuuri alkoi nousta alennustilastaan ja ranskankielisten taloudelliset mahdollisuudet lisääntyivät. Tuloksena oli omanarvon lisääntyminen.

Samankaltaisia uuden lain vaikutuksia voi nähdä myös muilla yhteiskunnan alueilla. Esimerkiksi USA:ssa hyväksyttiin rasismin kieltäviä lakeja 1950- ja 1960-luvuilla. Silloin epäiltiin, että vaikea on muuttaa ihmisten sisällä lujassa olevia käsityksiä lakien avulla. Miten voidaan lisätä suvaitsevaisuutta kun oikeudelliset normit näyttivät suosivan vähemmistön sortamista, kysyttiin? Mutta jos ihminen, joka olisi ollut poissa Yhdysvalloista 50 vuotta, palaisi sinne takaisin, hän huomaisi suuren muutoksen. Mustilla on yliopistollisia tutkintoja. Heitä on johtavissa asemissa yrityksissä ja hallituksen viroissa ja monissa ammateissa, kuten asianajajina, lääkäreinä ja tuomareina.

Vastaavia tuloksia löytyy monista muistakin maista esimerkiksi naisten oikeuksien turvaamisessa.

Tänään Euroopassa, kuten kolmisenkymmentä vuotta sitten Quebecissä, tarvitaan kansallisten kielten suojelua. Vaikka periaatteessa myös pienten jäsenmaitten kielet nauttivat tasa-arvois-

ta kohtelua EU:ssa, käytännössä ollaan ajautumassa siihen, että jotkut suuret kielet ovat tasa-arvoisempia kuin toiset ja suurista kielistä englanti on nousemassa ylitse muiden. Tämä näkyy myös EU:n instanssien ulkopuolella viihde-maailmassa, käännöskirjallisuudessa ja liike- ja viihdetoiminnassa. Tällä hetkellä kärsijöinä ovat etenkin pienet kielet, mutta vaarassa ovat myös yllättävää kyllä niin saksa, ranska, espanja kuin italiakin. Nämäkin kielet ovat jäämässä, jos nykyinen suuntaus jatkuu, maan sisäiseksi kieliksi. Käy niin, että esimerkiksi ranska on tänään kuten tanska tai hollanti eilen.

Näyttää siltä, että Ranskan, Espanjan, Italian ja Saksan hallituksetkaan eivät täysin ymmärrä missä ollaan menossa. Kyseessä ei ole EU:n käytävillä puhutuista kielistä, vaan laajemmassa kokonaisuudesta, jossa suuretkin kielet ovat jäämässä yhden kielen alle. Kyse on pitkälti taloudesta ja sen vaikutuksista tieteesiin, opintoihin, rahamaailmaan ja kulttuuriin.

Siinä mielessä kieliin liittyvät ongelmat ovat hankalia, että kehitys tapahtuu vähitellen ikään kuin huomaamatta. Luonnollisesti englanninkieliset ovat Brysselin tilanteeseen tyytyväisiä ja ovat valmiita puolustamaan ”omia etujaan” samankaltaisilla argumenteilla kuten englanninkieliset Quebecissä ja Alabaman valkoiset USA:ssa.

Toisaalta on nähtävissä myös paradoksi. Pienten kielten edustajien englannin taito vahvistuu. Saksalaiset ja ranskalaiset jäävät jälkeen syystä, etteivät ole puolustaneet riittävästi omia kieliään. He ovat vapaaehtoisesti luovuttaneet asemiaan englannille.

Pienten kielialueiden englannin kielen taidon kohentuminen ei merkitse sitä, että he olisivat tasavertaisia englantia äidinkielenään puhuvien

kanssa tai edes niiden kanssa, joilla on ollut tilaisuus opiskella tai työskennellä pitkään joko Englannissa tai Yhdysvalloissa.

Mikä siis ratkaisuksi EU:n kieliongelmaan? Tasapuolista olisi se, että esimerkiksi englantia puhuvat joutuisivat esiintymään EU:ssa jollakin muulla kuin äidinkielellään. Silloin kaikki olisivat tasavertaisia kielellisissä suhteissa. Tätä vastaan on kritisoitu sanomalla etteivät englantia puhuvat ikinä tähän suostuisi! Eli heidän mukaansa englannin kielen on oltava muita ylempänä. Demokratiaa tämäkin! Ja tottahan on, että tämä malli olisi käytännössä hankala toteuttaa, vaikka siinä tulisi otettua ainakin jollain lailla huomioon kielten tasa-arvoisuus.

Kun kielistä puhutaan, vähälle huomiolle on jäänyt Yhdysvaltain rooli. USA:ssa pidetään itsestään selvyytenä, että muissa maissa on opittava heidän kieltään. Kieli on vallan väline ja se on sitä salakavalan tehokkaasti. Yhdysvallat varjelee mustasukkaisesti omia (etu)oikeuksiaan. Varjot yltävät myös Eurooppaan. Monien mielestä USA pitää Eurooppaa (EU:ta) astinlautanaan. Jotain perää tässä on, vaikkei kaikkea Euroopan ja Yhdysvaltain suhteissa pidä yksinkertaistaa.

Miten kauan EU alistuu asemaansa ja hyväksyy amerikkalaisten johtavan roolin maailmanpolitiikassa ja maailmankaupassa? Jos vertailukohtana on EU:n väkiluku, korkea koulutus- ja teknologinen ja teollinen taso, euron vaikutus ja yhteiskunnan sosiaaliset olot, ei menne kauan ennen kuin vaaka alkaa kallistua Euroopan suuntaan. Tämän tajuten alkaa ymmärtää monien amerikkalaisten huolen johtavan roolin menettämisestä.

Jos jonkin kehittyneen teollisen alueen väkiluku on kaksinkertainen johonkin toiseen alueeseen verrattuna, ei tarvitse ennustajan lahjoja lopputuloksen suhteen. Mikäli Euroopan olot pysyvät suhteellisen tasapainoisina, USA:n merkitys tulee vähenemään. Jo nyt on nähtävänä tiettyä irtiotta Yhdysvaltain vaikutuksen alaisuudesta. Yhtenä esimerkkinä avaruustutkimus,

mm. paikannusjärjestelmä. Ristiriitoja ei tarvitse synnyttää, ne syntyvät vääjäämättömästi.

Politiikassa eletään luonnollisesti enemmän tätä päivää kuin tulevaisuutta. Silti politiikan tekijöiden olisi nähtävä tätä päivää pitemmälle. Niin kuin tiedetään imperiumit ovat tulleet ja menneet. Näin myös kielten osalta. Latina jäi reseptikieleksi ja ranskakin menetti asemansa. Suomessa yläluokan kielenä oli ensin ruotsi, jolta jalansijaa vei venäjä ennen kuin suomi pääsi sille kuuluvaan asemaan. Ennen toista maailmansotaa maamme kouluissa luettiin paljon saksaa. Nyt opitaan englantia maailmanpoliittisista ja kaupallisista syistä. Itä-Euroopan maissa on aina näihin päiviin saakka suosittu saksaa. Edes venäjä ei pystynyt saksan asemaa kokonaan horjuttamaan. Entisessä Neuvostoliitossa venäjä oli ”neuvostokansojen” yhteisenä kielenä. Se oli satelliittilähetysten kieli jne.

Se, jolla valta on, sen kieli valtaa alaa. Tämä on eräänlainen oravanpyörä jonka pyörimistä on vaikea hidastaa. Mutta jos ajatellaan EU:ta, mahdollisuudet uudenlaisen ratkaisun luomiseen ovat olemassa. Vaatii kuitenkin ennakkoluulottomuutta lähteä uudelle tielle. Silti sitä kaivataan, jos aiotaan toteuttaa tasavertaisesti ihmisten kielelliset oikeudet EU:n kaikilla tasoilla.

Minun ratkaisuehdotukseni EU:n kieliongelmaan ja käänöskustannuksien vähentämiseen on esperanton hyödyntäminen niin sanottuna apukielenä. Tiedän, että monilla nousevat tällaisesta ehdotuksesta karvat pystyyn. Silti kannattaisi pyristellä irti ennakkoluulojen pakkopaidasta.

Olen kerännyt eräitä tyypillisiä perusteluja, joilla kumotaan esperanton mahdollisuudet. Jokainen mieltiköön paljonko näissä perusteluissa on ennakkoluulolla höystettyä mielipidettä ja paljonko kriittisen tarkastelun kestävä perustaa.

”Englanti on nykyaikaa, esperanto on menneisyyttä.” ”Esperantoa ei opiskella koulussa”. ”Esperanto! Minulle riittää englanti, saksa ja hollanti”. ”Esperantoksi ei voi rakastella”. ”Espe-

rantoa ei puhuta missään”. ”Opettajien ja tulkki-
en koulutus tulisi kalliiksi”. ”Ihmiset eivät hy-
väksyisi esperantoa”. ”Siitä piti tulla kansain-
välinen kieli, muttei siitä tullutkaan”. ”Se ei ole
elävä kieli”. ”Se ei käytännössä toimi”. Ja niin
edelleen. Ne ovat vakaumuksen äänellä esitety-
jä mielipiteitä ihmisten suusta, jotka eivät usein-
kaan esperantosta tiedä juuri nimeä enempää.

Miksi kuitenkin esperanto leviää yhä laajem-
malle ja miksi sillä tuotetaan kirjallisuutta enem-
män kuin koskaan ennen? Vastaus on yksinker-
tainen. Se on helposti opittava, täsmällinen ja
taipuisa kieli. Se on käyttäjälleen elävä ja rikas
kieli, jota eivät kahlehti poikkeukset eivätkä
perinteet. Käännöskielenä se on mainio. Sillä
käydään vilkasta keskustelua netissä. Se on
myös kieli, joka ei kilpaile kenenkään äidinkie-
len kanssa.

Vain neutraalin kielen avulla kyetään tasa-
arvoisesti ratkaisemaan EU:n kieliongelma.
Muut vaihtoehdot loukkaavat aina jonkun oikeu-
utta.

Minusta jokaiselta joka asiaan voi vaikuttaa
voisi kysyä ”mitä olet tehnyt äidinkielesi oikeuk-
sien puolesta”. Mitä suomalaiset europarlamen-
taarikot ovat tässä suhteessa tehneet?

Tämän kirjoitelmani alkuosan aineistona olen
käyttänyt etupäässä yhdysvaltalaisen professori
Humphrey Tonkinin alustusta. Muilta osin ai-
neistona on muistiini piirtyneet katkelmat höys-
tettynä omilla ajatuksillani ja kokemuksillani. Ja
todettakoon vielä sekin, että en tunne antipatiaa
englannin kieltä kohtaan. En kuitenkaan voi
hyväksyä niitä kielellisiä ja muita valtapyrki-
myksiä, joita englannin avulla tavoitellaan.

*Ystävällisesti
Erkki Röntynen*

*Kirjoittaja **Erkki Röntynen** on Oulun Espe-
rantoseuran puheenjohtaja, joka asuu Oulun
pohjoisnaapurissa Haukiputaalla. Hän on val-
mistunut sosionomiksi Tampereen yliopistosta,
tehnyt leipätyönsä pääasiassa toimittajana leh-*



*distössä ja Eestin radion suomenkielisessä toi-
mituksessa, nyt ollut jo vuosia eläkkeellä. Ohei-
sen kirjoituksen synnystä hän kertoo seuraavaa:*

”Olin pohtinut jo pitkään aihetta. Varsinaisen
sysäyksen jutun tekemiseen sain, kun Hauki-
putaan Heiton 75-vuotisjuhlissa keskustelin
europarlamentaarikko Samuli Pohjamon kans-
sa EU:n kieliongelmista. Olin suunnitellut ai-
heesta artikkelia ja siksi esitin, että voisinko lä-
hettää kirjoitelmani hänelle. Samuli suhtautui
asiaan myönteisesti. Samalla sovimme, että hän
kopioi tekstin myös muille mepeille. Sen ver-
ran sain palautetta, että hän piti juttua mielen-
kiintoisena.”

Samuli Pohjamo
(kesk, s. 1950) on
haukiputaalainen
EU-kansanedustaja
vuodesta 1999 lähti-
en ja siellä aluepoli-
tiikka-, liikenne- ja
matkailuvaliokunnan
jäsen. Lisäksi hän on
Pohjois-Pohjanmaan
maakuntavaltuuston
jäsen ja koulutukseltaan valtiotieteiden maiste-
ri.



(mm)

Pietiläinen kandidatas por komitatano B

Jukka Pietiläinen, eksa redaktoro de nia gazeto kaj eksa prezidanto de EAF, la 3an de februaro anoncis en la retlisto *uea-membroj* pri malfermo de sia kandidata retpaĝo ĉe <http://www.uta.fi/~tijupie/kandidato.html>. Tiel li, verŝajne la unua en la historio de UEA, malfermis apartan retpaĝon cele al elektiĝo al posteno en la asocio.

Pietiläinen anoncas ke li pretas respondi al demandoj de membroj pri siaj estontaj celoj kiel komitatano kaj pri ĉio kio rilatas al sia kandidat-eco. En la kandidata paĝo aperas ankaŭ pli longa prezento ol la maksimume 150 vortoj permesataj en la oficiala prezento.

Individuaj membroj de UEA rajtas voĉdoni en la elektoj. La B-komitatanoj estas la reprezentantoj de la IM:oj en la komitato dum la A-komitatanoj reprezentas la membroasociojn kaj la C-komitatanoj estas spertuloj kiujn la A- kaj B-komitatanoj alelektas en la komitatanon. La estraro de UEA estas elektita el inter la komitatanoj. La novelektita komitato en Pekino elektos novan estraron por sia trijara oficperiodo.

El la statuto de UEA

Artikolo 29 de la statuto de UEA difinas la rolon de la komitato:

Al la Komitato apartenas ĉiuj kompetentecoj en la Asocio, kiuj ne estas rezervitaj, laŭ la leĝoj aŭ la Statuto, al aliaj instancoj.

La Komitato

(a) elektas inter siaj membroj Prezidanton, unu aŭ du Vicprezidantojn, Ĝeneralan Sekretarion kaj du ĝis kvin pliajn membrojn de la Estraro;


(b) rajtas nomi honorajn prezidantojn, honorajn membrojn kaj membrojn de la Honora Patrona Komitato;

(c) difinas la ĝeneralan agadon de UEA.

(ĉ) decidas pri aliĝo de landaj kaj fakaj asocioj kaj pri kontraktoj kun kunlaborantaj organizaĵoj

La reta bulteno Libera Folio kontribuas al la elekta etoso per siaj artikoloj. Interalie la kandidatiĝo de Jukka Pietiläinen estis jam anoncita en tiu forumo. Krome Libera Folio publikigas intervjuojn kun kandidatoj. Pietiläinen per la malfermo de sia kandidata retpaĝo volas vekti atenton pri la elektoj. Jen liaj vortoj: "En aprilo-majo venos la voĉdonilo, voĉdonu tiam! Ni havu rekordan partoprenon en la elektoj!"

(amr)



(d) decidas pri la regularoj;

(e) decidas pri la buĝeto kaj ekzamenas la financojn de la Asocio;

(f) decidas pri la agado de la Estraro;

(g) fiksas la kotizojn.

Mistera Neĝkovrita Altebenaĵo

Internacia Turisma Agado de Esperanto en Tibeto

De la 12-a ĝis la 16-a de oktobro mi sesope vizitis Tibeton kun kvin poloj, organizitaj de Internacia Klubo de EsperantoTur en Pollando. Tiu vizitado en Tibeto por konduki turisman agadon de Esperanto estis realigita laŭplane. Ĉi-foje invitive de Tibeto Universitato, prezidanto de Internacia Klubo de EsperantoTur en Bydgoszcz urbo de Pollando, s-ro Andrzej Grzebowski kun sia grupo kaj mi ekvojaĝis de Pekino al antikva urbo Xi'an kaj de tie flugis al Tibeto.

Tibeto, altebenaĵo kun la plej granda areo kaj la plej alta marnivelo en la mondo, mezkvante sidas en la alteco de pli ol 4000 metroj super la marnivelo kaj titoliĝas la "Monda Firsto". En tiu aŭtonoma regiono vivas ĉ. 90% da tibetnaci-anoj. La grandparto da tibetanoj kredas je budhismo kaj la moro kaj kutimo de tiu nacio estas aparta. Pro tio, ke ne ekzistas la malpurigo kaŭzita de gaso kaj vaporo ellasita el diversaj industrioj, en Tibeto la aero estas ege freŝa, la ĉielo estas ege lazura kaj aspektas pli alta, pli fora de tero, en la kulminoj de montegoj vidataj de okuloj estas pure blanka neĝo.

La ĉefurbo Lhasa situas en la sudmeza parto de Tibeto, ĉe la norda bordo de la Lhasa rivero, branĉo de Yaluzangbu rivero. Lhasa signifas "Sanktejon, Budhan Terenon, Elizeon". Ĝi estas enlistigita kiel la fama urbo de historio kaj kulturo de la ŝtato kaj estas unu el plej alte situantaj urboj super la marnivelo en la mondo. Tie vivas ĉ. sescent mil rezidantaj loĝantoj. Lhasa urbo havigis al si ankaŭ belajn nomojn de "Suno urbo, Sunlumo urbo".

Ni vizitis famajn Budala Palacon, Dazhao kaj Zhashilunbu templojn kaj aliajn vidindaĵojn, kaj en Lhasa ni agrable interŝanĝis kun Tibeto Universitato. La universitato ampleksas ses klasifikojn de literatura scienco, natura scienco, inĝeniera scienco, ekonomiko, arto kaj medicino kaj establis naŭ kolegiojn, fakultatojn kaj unu trejnan fakon por fremdlandaj studentoj kaj ankaŭ funkciigas la edukadon por plenkreskuloj. Nuntempe tie studas ĉ. 8000 studentoj kaj laboras ĉ. 2000 instruistoj kaj laboristoj.

Dum lastaj jaroj Tibeto Universitato aktive disvolvas diversajn interŝanĝojn kaj kunlaborojn



Ĉina-pola grupo antaŭ la Budala Palaco, simbolo de Tibeto.

***Liu Jianguo ĉe Sanxia
akvobarilo, la plej granda
konstruaĵo en la mondo.***

kun fremdlandaj akademiaj institucioj. Ĝi esprimas en la venonta semestro funkciigi Esperantan kurson por stimuli kaj subteni gestudentojn lerni kaj uzi Esperanton. Se Tibeto Universitato, estante la plej altnivela klerigejo en Tibeto, povus sukcese funkciigi oficialan kurson de Esperanto, tio ne nur elkulturos novajn tibetajn esperantistojn kaj senmankigos la blankaĵon de ĉina

Esperanto-movado en Tibeto, sed ankaŭ eĉ ofertas aktivan influon al la internacia Esperanto-movado kaj multe kontribuos al diskonigo de tibeta kulturo kaj turismaj riĉfontoj inter nacioj dank' al Esperanto!

Dum la restado en Tibeto, nia vizitado kaj esplorado estis multsukcesa kaj al ni grandan helpon kaj subtenon Tibeto Universitato kaj tibeta departemento pri turismo favoris.

*s-ro Liu Jianguo
(prezidanto de Ĉina Hefei Verdstelo
Esplora Instituto pri Turismo)*

Niaj programoj de Esperanto kun UK kaj Tibeto estas defrue pretaj por Vi!

- ◆ 89-a Universala Kongreso de Esperanto (UK)
- ◆ 14-a Internacia Kongreso de Esperanto (IKE)
- ◆ 2004 Malkovra Agado de Tibeto – Mistera Firsto de la Mondo (MAT)

Internacia kaj Ĉina Klubo de "Esperantotur" kaj Ĉina Hefei Verdstelo Esplora Instituto pri Turis-



mo kune okazigos IKE kaj praktikos MAT por progresigi Esperanto-turismon en Ĉinio kaj praktiki Esperanton en turismo. Kun ekskurso UK, IKE kaj MAT dispartiĝos en kelkaj etapoj:

2004.07.23.-31. en Pekino kaj Tianjin;

2004.07.23.-08.05. en Pekino, Xi'an kaj Tibeto;

2004.07.23.-08.16. en Pekino, Xi'an, Tibeto, Chengdu, Chongqing, Tri Grandaj kaj Malgrandaj Gorĝoj, plej granda Sanxia akvobarilo en la mondo, Uhano, Hefei, Suzhou, Hangzhou kaj Ŝanhajo;

2004.07.23.-08.20. en Pekino, Xi'an, Tibeto, Chengdu, Chongqing, Tri Grandaj kaj Malgrandaj Gorĝoj, plej granda Sanxia akvobarilo en la mondo, Uhano, Hefei, Suzhou, Hangzhou, Ŝanhajo, Kantono, Hongkongo kaj Makao.

Ĉiu etapo kunligiĝos kun la 89-a UK.

Konsultu la detalojn ĉe: s-ro Liu Jianguo, Langyashan Lu, Changhuai Xincun, B-Qu 3-105#, CN-230011, Hefei, Ĉinio. Tele: 0086-551-4484370; Faks.: 0086-551-4210414; ret-adr.: <yjs00815@mail.hf.ah.cn>.

La Reta Informado-Centro (RIC)

RIC, la Reta Informado-Centro (www.tejo.org/ric), naskiĝis novembre 2002 dum seminario de Esperanto ĉe Interreto en Lesjöfors, Svedio. La celo estas bone kaj ĝuste informi al la mondo pri Esperanto. Ĝi evoluis el la ideo, ke oni pere de la reto povus kolekti informmaterialon kaj konsilojn pri informado en unu loko publike alirebla por ĉiuj. Pro tio RIC konsistas el du partoj: Unu estas paĝaro kun konsiloj pri kiel bone informadi. Ĝi kovras publikan paroladon, varbadon dum budoj kaj rilatojn kun gazetoj. Tiu parto ankaŭ enhavas bazajn faktojn pri la lingvo Esperanto kaj ligite al ĝi pri la movado, ĝia kulturo, kaj Zamenhof. Aldone ĝi prezentas konsilojn de spertuloj pri informado. La filozofio estas, ke oni ne rakontu mitojn pri Esperanto, sed argumentu kun konkretaj faktoj.

La dua parto konsistas el datumbazo kun diversaj informiloj el la tuta mondo. Eblas alŝuti viajn informilerojn, fotojn, afiŝojn k.s. de via hejma komputilo al RIC kaj tiel disponigi ilin al aliaj interesuloj por ke aliaj povu elŝuti kaj uzi ĝin.

RIC ne estas statika afero, sed dinamika. La teamo, kiu konstruis kaj nun vivtenas ĝin, dependas de kontribuoj kaj spertoj de esperantistoj, kiuj aktivas en informadkampo, por pliriĉigi la enhavon kaj por montri diversajn spertojn ene de la informadagado. Se vi havas komentojn, spertojn aŭ materialon ni ĝojos aŭdi ilin. Simple retu nin ĉe ric@ikso.net. Dankon!

David-Emil Wickström

Euroscola-vojaĝo en aprilo – ankoraŭ kelkaj liberaj lokoj

La gimnazio de Enontekiö partoprenos al Euroscola en la EU-parlamentejo la 28an de aprilo. El la lernejo, kie instruas Pekka Välimäki, partoprenos 19 junuloj kaj de Kimito venos tri.

Invitataj estas ankaŭ junuloj de aliaj partoj de Finnlando sed ili ankoraŭ ne konfirmis sian partoprenon. Do se vi interesiĝas vi povas kontakti min! Se ne estas loko por vi ĉi-jare, vi ja povos partopreni estonte.

Lige al la vizito en la EU-parlamentejo estas alia programo. La vojaĝo komenciĝas de HKI-flughaveno la 24an de aprilo je la 17a horo. Ves-

The screenshot shows a web browser window titled "Reta Informado-Centro (RIC)". The address bar shows the URL "http://www.tejo.org/ric/konsiloj/oftaj_demandoj.php". The page content is titled "Oftaj demandoj pri Esperanto" and lists several questions and answers:

- Demandoj:** Anna Skudlarska kaj Jevgenij Gaus
- Respondo-provoj:** Ziko M. Sikosek
- 1. Kio estas Esperanto?**
Oni povas miri pri tiu demando, sed eble la ĵurnalisto vere ne scias tion, aŭli volas simple aŭdi tion per la propraj, aŭtentikaj vortoj de esperantisto. Fakte, tio estas bona ŝanco por vi - oni donas al vi la eblecon mem influi la direkton de la intervjuo, per lerta respondo. Via respondu estu mallonga kaj baza: internacia lingvo, kiu evoluiĝis laŭ la projekto de sinjoro Zamenhof en Varsovio, aŭ simile. (vidu dokumenton "Ne-mitaj faktoj pri Esperanto")
- 2. De kie devenas la nomo Esperanto?**
Kompreneble oni scivolemas la devenon de tiu stranga vorto. La titolo de la projekto de Zamenhof estis "Internacia lingvo", kaj li uzis la pseŭdonimon "Esperanto". Ĉar li timis ke li povus ricevi problemojn - estis ja la cara Ruslando, kiu tre suspektis novajn aferojn. Sed li tre rapide malkaŝis la pseŭdonimon, kaj pere de "la lingvo de esperanto" kaj "esperanto-lingvo" ĝi fariĝis la nomo de la lingvo.
- 3. Kiam kaj kiel ĝi aperis?**
Zamenhof estis judo el la getto, kaj spertis etnajn konfliktojn sur la stratoj de la multpopola Ruslando. En 1887 li eldonis broŝuron, en diversaj lingvoj, kun la bazaj reguloj kaj eta komenca vortaro.
- 4. Ĉu vi vere povas diri ĉion kion vi volas en Esperanto?**
La esperantistoj komunikas per Esperanto pri tre malsamaj aferoj: ekzemple, la internaciaj Esperanto-asocii kompreneble havas estrarajn kunsidojn kio en Esperanto. Oni verkas

The sidebar on the left contains navigation links: **Konsiloj** (Ĝenerale, Tipografio, De spertuloj, Gvidlinioj, Oftaj demandoj), **Informiloj** (Afiŝoj, Flugfolioj, Informiletoj, "Gisdate", "Praga manifesto"), **Informileroj** (Fotoj, Grafikaĵoj), **Faktoj** (Zamenhof, Esperanto, La movado, La kulturo), and **Diskutoj** (Retpoŝtilistoj). The right sidebar features logos for RIC, EŬJ, tejo, uea, and a link to "Komentoj al ric@ikso.net".

La Oftaj demandoj -paĝo en la Reta Informado-Centro.

Informbazar

pere ni renkontos junajn esperantistojn en Frankfurto, kie ni tranoktos en "Haus der Jugend". Dimanĉe ni rigardos Frankfurton kaj vespere ni iros al Strasburgo, la junulargestejo CREPS.

En CREPS ni renkontos junulojn de almenaŭ Slovenio kaj Anglio. Kune kun ili ni partoprenos al seminario Europa Amikeco. Lunde kaj marde ni diskutos diversajn temojn, rigardos la urbon kaj amuziĝos.

Merkrede estos la Euroscola-tago kaj ĵaŭde matene ni revenos tra Frankfurto. Ni estos denove en Helsinko je 14.10 la 29an de aprilo.

Ankaŭ por la jaro 2005 ni planas similan vojaĝon. La gimnazio en Kimito jam anoncis sin kiel aranĝanta lernejo. La celo de la projekto de ELFI estas ke ni ĉiun jaron povu sendi grupon al Strasburgo. Indas por junuloj lerni la internacian lingvon. Ju pli bone oni regas esperanton des pli interesa estas la vojaĝo.

*Carola Antskog, prezidanto de ELFI
cantskog@kolumbus.fi, tel 050-5817272*

Eŭropa Bunto – Kirjava Eurooppa – Europeiskt Kaleidoskop

Nun ekzistas provizora programo por la manifestacio en Strasburgo la 9an de majo.

- 9:00 Rendevuo ĉe la "Place de l'Université" de Strasbourg
11:00 Bonvenigaj vortoj de la organizantoj kaj de la delegacioj
11:30 Manĝo & pikniko.
12:30 Koncerto de JoMo, (Jean-Marc Leclerc, de Tuluzo, kiu kantas en pluraj lingvoj laŭ rekordlibro)
14:00 Starto de la manifestacio. Ne-rapida iro tra la "allée de la Robertsau" kaj "avenue de l'Europe": parado, sloganoj, banderoloj, flagoj, kantoj, dancoj, ktp.
15:30 Alveno al la "Orangerie" (apud Europaj Parlamentejo & Konsilio)

16:00 Mallongaj prelegoj de diversaj partoprenantaj asocioj. Fina parolado de grava eŭropa persono

17:00 Disiĝo de la manifestacio

Por informoj: Eŭropa Bunto, 6 rue J-P Calloc'h, F-22000 St-Brieuc (FRANCE). Tel: +33 (0)2-96.68.55.21. Retadreso: <europa.bunto@eraro.com>.

Lähemmin: Tuomo Grundström, 050-5180 590, <tgrundstrom@www.lailanet.fi>

Närmare information: Carola Antskog, 050-581 7272, <cantskog@kolumbus.fi>

Eventokalendaro de EAF

2004

13-14.3.2004 Vintraj Tagoj en Jyväskylä kristillinen opisto (aliĝilo ĉi-numere, ilmoittautumislomake tässä numerossa)

24-29.4.2004 Eŭropa Amikeco-renkontiĝo + Euroscola, Strasburgo, Francio (ELFI)

5.-9.7.2004 Kursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)

10.-17.7.2004 IJK apud Kovrov, Ruslando (TEJO)

24.-31.7.2004 UK en Pekino, Ĉinio (UEA)

25.-29.8.2004 Eŭropa Esperanto-Kongreso, Bilbao, Eŭskio, Hispanio (EEU)

septembro Aŭtunaj Tagoj (Iisalmi)

2005

februaro/marto Vintraj Tagoj

somero Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinko (planas FEJO)

somero Internacia evento en Raŭmo (planas EAF)

23-30.7.2005 UK en Vilnius, Litovio (UEA)

septembro Aŭtunaj Tagoj (ekis kontaktoj kun svedaj esperantistoj pri okazigo de AT kiel ekskurson al Esperantodomo en Lesjöfors)

Luonnonkauneutta ja kieliopintoja
Valamon ihmeellisessä ilmapiirissä

Esperanto-kurssit Valamon kansanopistossa 5.-9.7.2004

Esperantokurssit Valamon kansanopistossa ovat muodostuneet kesäiseksi perinteeksi. Tänä vuonna kurssit järjestetään jo viidennen kerran. Kurssitasoja on nyt kaksi: aloittelijat ja jatkajat.

Opettajina ovat Atilio Orellana Rojas ja Raita Pyhälä, molemmat kokeneita esperantonopettajia. Atilio Orellana Rojas, joka on kotoisin Argentiinasta, on kansainvälisesti arvostettu opettaja. Päätyökseen hän työskentelee kansainvälisessä esperanto-opistossa IEI:ssä Haagissa, Hollannissa. Raita Pyhälä on lestijärveläinen kieltenopettaja. Myös hänellä on kansainvälistä kokemusta esperantonopettamisesta.

Monipuolista opetusta

Jatkajille on luvassa vastaava elämys kuin tois-savuonna menestyksellisesti toteutettu suggestopedinen kurssi, opettajana jälleen Atilio. Alkeiskurssilla aloitetaan ihan alusta. Pääopettajana on Raita, mutta toki alkeiskurssilaisetkin saavat tuntuman Atilion opetustaidosta sillä hän ohjaa myös heitä noin tunnin verran päivittäin; suggestopediaan sukeltautuvat saavat silloin hieman hengähtää.

Tule mukaan oppimaan esperantoa Valamon ihmeelliseen ilmapiiriin. Valamo on paljon muu-

takin kuin vain pelkkää luokassa istumista: opituntien lisäksi tutustumme ympäristöön ja viettämme yhteisiä iltoja. Yhteinen saunailta aidossa suomalaisessa savusaunassa keskiviikkona tutustuttaa meidät myös jännittävään kämppä Riskiin. Tervetuloa niin uudet kuin vanhat Valamon kävijät!

Kurssimaksu ja ilmoittautumiset

Viiden päivän kurssin hinta on majoituksesta riippuen 203 eurosta 274 euroon. Hintaan sisältyy majoitus, opetus, aamiainen, lounas, päiväkahvi ja iltatee päivittäin sekä viimeisenä iltana juhlaillallinen.

Mahdollisuus tulla paikalle jo sunnuntaina 4.7. ilman erillistä yöpymismaksua. Jos sunnuntaina saapuu paljon kurssilaisia, vietetään epävirallinen aloitusilta. Kurssi päättyy perjantaina lounaaseen klo 11.30.

Ilmoittautuminen tapahtuu suoraan Valamon kansanopistoon, osoite: 79850 Uusi-Valamo, puhelin 017-5701400, faksi 017-5701402, sähköposti: <valamon.kansanopisto@valamo.fi>. Opisto lähettää ilmoittautuneille maksulomakkeen ja lisätietoja.

Ulkomaalaisia pyydetään ilmoittautumaan Suomen Esperantoliitto ry:n eli EAF:n kautta. Kurssi järjestetään yhteistyössä EAF:n kanssa, yhdyshenkilöinä liiton sihteeri Tiina Oittinen ja ELFI:n puheenjohtaja Carola Antskog (osoitteet sivulla 2 tai lehden takasisäsivulla). Heiltä saa lisätietoja kurssista, kurssin päivittäisen ohjelman ja tarvittaessa ulkomaalaisia varten tehdyn ilmoittautumislomakkeen.

Tutustu myös EAF:n kotisivuilla <www.esperanto.fi> olevaan tietoon.



Naturbeleco kaj esperantolernado
en monaĥeja etoso

Esperanto-kursoj en la Popola Instituto de Valamo 5.-9.7.2004

Belega naturo, bonhumoraj kaj bonkoraj homoj, travivaĵoj pere de Esperanto atendas vin en orienta Finnlando meze de julio. Dum Esperanto-kursoj en Popola Instituto de Valamo vi povas lerni la internacian lingvon en ĉiuj niveloj. Spertuloj povas helpi la novulojn.

Sugestopedia daŭriga kurso

Ĉiutage estos instruado ĉirkaŭ 5 horojn: Tiuj, kiuj ne ankoraŭ konas la lingvon komencas de la unuaj aferoj. Aliaj profundigos sian lingvoscion pere de sugestopedia kurso de Atilio (kaj vi kiuj jam scipovas la lingvon diskutos, aktoros, legos artikolojn kaj resumos ilin, aŭskultos/faros prelegetojn ktp). Je via dispono estos du instruistoj kaj la kursogvidanto.

Varia programo

Posttagemeze kaj vespere estos aranĝataj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo. Vespere estos komuna programo kun prelegetoj, kunkantado, kunludado, muzikado, saŭnumado (eĉ en vera finna fumsaŭno), manĝado. Ĉio tio en trankvila etoso de la monaĥejo: laŭvole eblos al vi viziti ortodoksan diservon en belegaj preĝejoj en la areo.

Bazaj informoj

La kursosemajno: 5.-9.7.2004.

La loko: Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, orienta Finnlando

Instruistoj: Atilio Orellana Rojas el Nederlando/Argentino kaj Raita Pyhälä (Saliko) el Finnlando. Kursogvidanto: Tiina Oittinen

Se vi volas vidi kia la loko estas, iru al www.valamo.fi. Notu, ke en la Popola Instituto de Valamo la personaro nek parolas esperanton nek


respondas al esperantlingvaj retroŝtoj. Bonvolu kontakti pere de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Prezoj de la kursosemajno 203-274 eŭrojn depende de tranoktado.

Petu pliajn informojn de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF).

Kontaktulo: Tiina Oittinen, sekretario de EAF, adreso: Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, tel: 02-2305319, sekretario@esperanto.fi.

Pliaj informoj ankaŭ de Carola Antskog, sekcioestro de ILEI en Finnlando, adreso: Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi.



Vintraj Tagoj de EAF

Suomen Esperantoliiton talvipäivät

Jyväskylä en la centro de esperantohistorio
Jyväskylä keskellä esperantohistoriaa
Jyväskylä i centrum av esperantohistorien

13.-14.3.2004

Kristana Instituto de Jyväskylä/Jyväskylän kristillinen opisto
Sulkulantie 28 (urboparto/kaupunginosa: Kuokkala)

Dum la sekvaj Vintraj Tagoj de EAF en Jyväskylä ni reiros al la pionira epoko de la esperantomovado en Finnlando. Antaŭ cent jaroj, en 1904, aperis la unua lernolibro de esperanto kaj estis registrita la unua esperantoasocio en nia lando. La asocio estis fondita la antaŭan jaron en Jyväskylä. Ankaŭ alimaniere Jyväskylä ne nur troviĝas en centra Finnlando sed ankaŭ centre de nia historio. En Jyväskylä okazis someruniversitataj kursoj de esperanto dum 30 jaroj. En 1987 EAF organizis la festadon de la centjariĝo de esperanto ĝuste en Jyväskylä. Ni rememoros tiujn eventojn kaj konatiĝos kun la historiaj temoj. La anoj de la nove fondita laborgrupo pri historio de EAF, Jukka Laaksonen, Jukka Pietiläinen kaj Mikko Mäkitalo, prezentos siajn unuajn pensojn pri la laboro farota prepare al la centjariĝo de EAF 2007.

Kiel komenco de Vintraj Tagoj estos organizita bustransporto ĉe la stacidomoj de Jyväskylä. Nin atendas aŭtobuso je la 11.00, kiu veturigos nin al la funkciejo de la gazeto Keski-suomalainen. Ni konatiĝos kun la laboro de Johan Edvard Leppäkoski (3.11.1901-5.12.1984), la tradukinto de Kalevala, pere de vizito al la redaktejo de la gazeto kie li laboris. Samtempe ni ankaŭ konatiĝos kun la nuntempa gazeta laboro kaj ĝenerale kun ties historio. La vizito al Keski-suomalainen kontribuas kadre de nia projekto

Al kvalita komunikado al altigo de la kvalito de nia informa agado.

Post la redakteja vizito la buso plustransportos nin al la kristana instituto, kie okazos la cetero de nia programo. Tie ni ankaŭ manĝos kaj tranktos. Krom la prihistoriaj programeroj sabate estos ankaŭ tempo por diversaj kunvenoj kaj akcepto de Societo Nino Runeberg. Ankoraŭ eblas aliĝi al tiu ĉi subtenocieto per pago de 36 eŭroj al la banka konto de EAF aŭ surloke en Jyväskylä. Vespere ni konatiĝos kun niaj diversaj aktivecoj en evento kiun ni nomas *Societa bazaro*. Membrosocietoj kaj aliaj agantoj povos libere prezenti sin ĉe tablostandoj.

Dimanĉe KELF laŭtradicie organizos matenpreĝon kaj EAF jarkunvenos. Fine ni konatiĝos kun la stato de nia Esperantujo el la perspektivo de Osmo Buller kiel nuna direktoro de la Pää-talo-instituto kaj kiel eksa kaj estonta ĝenerala direktoro de UEA. Ni havos okazon diskuti kaj doni niajn vidpunktojn pri nia monda asocio. Post la kafo dimanĉe denove estos bustransporto el la instituto al la stacidomoj ĉ. je la 15.30, tiel ke ni atingos la taŭgajn transportilojn.

Aliĝado kaj kontaktpersonoj

Sendu aliĝilon al la oficejo de EAF kaj pagu la kotizojn al la konto de la Asocio. Pri la programo vi povas kontakti la prezidanton Anna Ritamäki,

pri la tranoktoj kaj manĝoj kaj societa bazaro sekretarion Tiina Oittinen. Respondeculoj pri la aliĝiloj kaj pagoj estas Päivi Saarinen kaj Anna-Liisa Heikkinen. Loka kontaktpersono en Jyväskylä estas Seija Kettunen. *Bonvenon!*



Suomen Esperantoliiton (EAF) syyspäivät Jyväskylässä palauttavat mieliimme esperantoliikkeen alkuvaiheet Suomessa. Jo sata vuotta sitten, vuonna 1904, ilmestyi ensimmäinen suomalaisille tarkoitettu esperanton oppikirja ja samana vuonna Suomessa rekisteröitiin ensimmäinen esperantoyhdistys. Yhdistys oli perustettu edellisenä vuonna Jyväskylässä, joka aina on ollut monella tavoin myös keskellä Suomen esperantohistoriaa. Jyväskylän kesäyliopistossa järjestettiin esperanton kesäkurseja kolmenkymmenen vuoden ajan ja jyväskylälainen kurssinvetäjä Seija Kettunen oli aloittamassa myös Valamon kesäkurseja. Esperanton juhluvuonna 1987 Suomen Esperantoliiton pääjuhlallisuuDET järjestettiin juuri Jyväskylässä. Talvipäivillä muistelimme mm. näitä tapahtumia ja tutustumme historiaamme. EAF:n juuri perustettu historiatyöryhmä, Jukka Laaksonen, Jukka Pietiläinen ja Mikko Mäkitalo, kertoo ensimmäisistä suunnitelmista ja ideoista EAF:n satavuotisjuhlavuotta 2007 silmälläpitäen.

Talvipäivät alkavat vierailulla sanomalehti Keskisuomalaisen toimitaloon, jossa tutustumme lehden toimintaan. Esperantopiireissä Kalevalan kääntäjänä tunnettu Johan Edvard Leppäkoski työskenteli Keskisuomalaisen toimittajana ja vierailun aikana saamme tietoa myös hänen elämäntyöstään. Vierailu on osa EAF:n informaatioprojektia *Laatua viestintään*. Vierailun jälkeen bussi kuljettaa meidät talvipäivien tapahtumapaikkaan Jyväskylän kristilliseen opistoon, jossa ohjelma jatkuu lounaan jälkeen.

Lauantain ohjelmassa on historiaosuuden lisäksi varattu aikaa eri jäsenyhdistysten kokouksille sekä juuri ennen iltapalaa Nino Runeberg-seuran vastaanotolle. Voit vielä liittyä tämän

Aliĝilo

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 13.-14.3. 2004.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Retadreso _____

Aliĝkotizo:

16 e ĝis 25.2 aŭ _____

tri tagoj post gazetoapero

20 e poste _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo kaj personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

La kunvena paketo **13.-14.3. (tranokto, 2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo)**

62 e dulita ĉambro _____

92 e unulita ĉambro _____

42 e amasloĝejo _____

32 e nur manĝopaketo (2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo) _____

Entute **pagenda al la konto de EAF** _____

Deziroj koncerne tranokton aŭ manĝojn: _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825

BONVENON!

Ilmoittautumislomake

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Talvipäiville 13.-14.3.2004.

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Osallistumismaksu:

16 e 25.2 mennessä tai kolme päivää lehden ilmestymisen jälkeen _____

20 e myöhemmin _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Alle 15-vuotiaat lapset ilman osallistumismaksua ja Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Kokouspaketti 13.-14.3. (majoitus, 2 lounasta, 2 kahvia, iltapala)

62 e 2 hengen huone _____

92 e 1 hengen huone _____

42 e yhteismajoitus _____

32 e vain ruokapaketti (2 lounasta, 2 kahvia, iltapala) _____

Yhteensä **maksettava EAF:n tilille** _____

Toivomuksia majoituksen tai ruokailun suhteen: _____

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto ry
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825

TERVETULOA!

Suomen Esperantoliiton toimintaa tukevan seuran jäseneksi maksamalla vuosimaksun 36 euroa joko liiton tilille tai paikan päällä Jyväskylässä. Iltapalan jälkeen ohjelmassa on yhdistysbasaari, jonka aikana jäsenyhdistykset kertovat vapaa-muotoisesti toiminnastaan omien pienten näytelypöytien yhteydessä. Näyttämö on vapaa erilaisille esityksille kuten lauluille, runoilille ja näytelmille ym.

Sunnuntaina KELF:n perinteisesti järjestämän aamuhartauden jälkeen pidetään Suomen Esperantoliiton vuosikokous. Lounaan jälkeen Osmo Buller, Pääalo-instituutin johtaja ja huhtikuusta alkaen jälleen Esperanton maailmanliiton pääjohtaja, kertoo esperantomailman tilanteesta sekä kokemuksistaan esperantosta. – Kahvin ja päätössanojen jälkeen on noin kello 15.30 bussikuljetus Jyväskylän matkakeskukseen.

Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Lähetä ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon ja maksa sen mukaiset maksut liiton pankkitilille. Ohjelmaan liittyvistä asioista voit ottaa yhteyttä puheenjohtaja Anna Ritämäkeen, majoitusta ja ruokailua sekä yhdistysbasaaria koskeviin kysymyksiin vastaa sihteeri Tiina Oittinen. Ilmoittautumislomakkeista ja maksuista huolehtivat Päivi Saarinen ja Anna-Liisa Heikkinen. Paikallinen yhteyshenkilö Jyväskylässä on Seija Kettunen. *Tervetuloa!*

Programo – Ohjelma

Sabato / Lauantai, 13.3.2004

11.00 Aŭtobuso ekde la stacidomoj de Jyväskylä, antaŭ la malnova fervoja stacidomo; vizito al la funkciejo de la gazeto Keski-suomalainen, adreso: Aholaidantie 3 / Bussikuljetus Jyväskylän Vanhan asemarakennuksen tilausajopysäkiltä; vierailu sanomalehti Keski-suomalaisen toimitalossa, osoite: Aholaidantie 3

12.30 Malfermo de akceptejo / Vastaanotto avataan

- 12.30 Lunĉo / Lounas
 14.00 Bonvenigaj vortoj / Tervetuliassanat
 14.15 Programeroj pri nia historio / Ohjelmaa historiastamme
 15.45 Kafo / Kahvi
 16.15 Programeroj pri nia historio / Ohjelmaa historiastamme
 17.00 Kunvenoj de FEJO, ELFI, KELF, ktp / Kokouksia: FEJO, ELFI, KELF ym.
 18.45 Akcepto Nino Runeberg / Vastaanotto Nino Runeberg -seuran jäsenille
 19.00 Vespermanĝeto / Iltapala
 20.00 Societa bazaro / Yhdistysbasaari (membrosocietoj rakontas libere pri loka agado ĉe ekspoziciaj tabletoj / jäsenyhdistykset kertovat vapaamuotoisesti toiminnastaan omien pienten näyttelypöytien yhteydessä)

Dimanĉo / Sunnuntai, 14.3.2004

- 8.00 Matenmanĝo / Aamiainen
 9.00 Matenpreĝo de KELF / Aamuhartaus, järj. KELF
 9.45 Kontrolo de rajtigiloj / Valtakirjojen tarkastus
 10.00 Jarkunveno de EAF / Vuosikokous
 12.30 Lunĉo / Lounas
 13.30 Osmo Buller: Trapasaj perspektivoj inter Päätalo-instituto kaj UEA. / Osmo Buller: Kokemuksia esperantosta Päätalo-instituutissa ja Esperanton maailmanliitossa.
 15.00 Adiaŭa kafo / Kahvi ja loppusanat
 15.30 Aŭtobuso ekveturas al stacidomoj / Bussikuljetus Jyväskylän matkakeskukseen

Sabate 13.3. je 22.30 en trinkejo
 Poppari senpaga koncerto de
Dolchamar.

Lauantaina 13.3. kello 22.30
 musabaari Popparissa maksuton
Dolchamarin konsertti.

Societa bazaro – ni montru nian agadon!

La sabatan vesperon de Vintraj Tagoj en Jyväskylä ni pasigos en bazara etoso en la ĉefsalono Sulkula. EAF disponigos tablojn por ĉiuj societoj kaj aliaj grupoj, kiuj deziras prezenti sin kaj eventuale vendi diversajn produktojn. La partoprenantoj povos interbabili kaj ĉirkaŭiri por konatiĝi kun la diversaj standoj.

Ĉu via societo havas iujn gravajn aĵojn, ekz. rememoraĵojn de grava evento de via historio? Ĉu vi havas tablostandardon, aparte belan flagon aŭ propraspecan tablotukon? Vi havos ŝancon prezenti vin kaj vian agadon! Kiel aspektas viaj broŝuroj? Ĉu vi havas librojn pri via historio? Ĉu vi produktis T-ĉemizojn, insignojn, glumarkojn, librojn aŭ entuziasme ŝatus peri iun revuon ...? Preparu vin por la societa bazaro! Jen ŝanco trovi aĉetantojn por viaj varoj!

Bonvenaj distraĵoj por nia bazaro estas ankaŭ diversaj prezentetoj, ekz. poemlego, ludo aŭ kantado. Kunordiganto por la societa bazaro estas Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, tel: 02-2305319, <sekretario@esperanto.fi>.

Venu amase al nia bazaro!

Yhdistysbasaari esittelee toimintaamme

Jyväskylän talvipäivien iltaohjelman Sulkula-salissa teemme me kaikki yhdessä: kukin jäsenjärjestö ja -ryhmä esittelee toimintaansa yhdistysbasaarissa.

Käytössä oleville pöydille voi helposti laittaa esille yhdistyksen esitteet, pöytästandardin, myytävät tavarat ja kaiken muun mitä haluatte kertoa toiminnastanne. Talvipäivien osallistujat – tietenkin myös kunkin yhdistyksen esittelijät – kiertelevät esittelypöydästä toiseen, tutustuvat toistensa toimintaan ja saavat siten tietoja sekä vinkkejä siitä miten esperanton tunnetuksi tekeminen ja käytön edistäminen onnistuu parhai- ▷

Koncize pri Leppäkoski

Joh. Edv. Leppäkoski (3.11.1901-5.12.1984) komencis gazetlaboristan karieron en gazeto Käkisalmen Sanomat 1924 kaj estis en ĝi redakta sekretario kaj redaktoro ĝis la finna Vintra milito (kiu okazis nov 1939 – mar 1940). Al posteno de redakta sekretario de gazeto Keskisuomalainen (aperas en Jyväskylä) li estis elektita novembro 1940 kaj el tio li pensiuliĝis 1966, t.e. post 26 jaroj da laborado.

Liaj babilaĵoj en Keskisuomalainen per pseŭdonimo Joonas estis popularaj ne nur ĉe legantoj de la gazeto, sed ankaŭ ĉe laborejaj kolegoj. Li skribis en la gazeto kelkfoje ankaŭ pri Esperanto.

Jam dum laborado en Käkisalmi (urbo en Karelio, ekse Finnlando sed ekde la Vintra milito Rusio) li komencis traduki Kalevala en Esperanton. Tiu manuskripto tamen perdiĝis dum rifuĝa veturo el regionoj, kiujn trafis la milito. Estas rakontata, ke Leppäkoski konstatis, ke la perdiĝo estis fakte bonŝanco, ĉar la manuskripto estis ankoraŭ tiom kruda versio. Transloĝiĝinta en Jyväskylä li komencis tradukadon denove kaj en jaro 1964 aperis nia nacia epopeo Kalevala en Esperanto.

Leppäkoski tradukis en Esperanton ankaŭ poemojn. Lia edzino donacis poemtradukojn al Esperanto-Asocio de Finnlando post morto de Leppäkoski.

(tradukis mm)

ten. Myös muistot valokuvien ja lehtileikkeiden muodossa ovat kiinnostavaa katseltavaa – niistäkin saa vinkkejä.

Näyttämö on vapaa erilaisia esityksiä varten, esittää voi runoja, lauluja, yhteisleikkejä, pikku näytelmiä ym. Sihteerinne Tiina toimii yhteys-henkilönä, jolta saatte tarvittaessa lisätietoja: Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, puh: 02-2305319, <sekretario@esperanto.fi>.

Tulkaa joukolla mukaan basaariin!



Lyhyesti Leppäkoskesta

Joh. Edv. Leppäkoski (3.11.1901-5.12.1984) aloitti lehtimiesuransa Käkisalmen Sanomissa 1924 ja toimi lehden toimitussihteerinä ja toimittajana talvisotaan saakka. Sanomalehti Keskisuomalaisen toimitussihteeriksi hänet valittiin marraskuussa 1940 ja siitä toimesta hän jäi eläkkeelle 1966, siis 26 vuoden työrupeaman jälkeen.

Keskisuomalaiseen hänen Joonas-nimimerkillä kirjoittamansa pakinat olivat suosittuja paitsi lehden lukijoiden myös työtovereiden keskuudessa. Hän kirjoitteli lehteen silloin tällöin myös esperantosta.

Jo Käkisalmissa työskennellessään hän aloitti Kalevalan kääntämisen esperanton kielelle. Tämä käsikirjoitus kuitenkin katosi evakkomatkan aikana. Leppäkosken kerrotaan todenneen, että se oli itse asiassa hyvä asia, sillä se oli vielä melkoinen raakile. Jyväskylään muutettuaan hän aloitti käännöstyön uudelleen ja vuonna 1964 ilmestyi kansalliseepoksemme Kalevala esperantonkielisenä käännöksenä.

Leppäkoski käänsi esperantoksi myös runoja. Hänen vaimonsa lahjoitti runokäännöksiä Suomen Esperantoliitolle Leppäkosken kuoleman jälkeen.

Seija Kettunen

Esperantoklubo de Jyväskylä 40-jara

Esperantoklubo de Jyväskylä festis sian 40-an datrevenon la 17-an de decembro 2003 “en la familia rondo”. Ĉeestis entute 9 klubanoj, kiuj rememoris la komencajn jarojn de la klubo aŭskultante la protokolon de la fonda kunveno, kiu okazis 26.4.1963. Ni aŭskultis ankaŭ la kasedon, kie Marjatta Linjama intervjuis Liisa Nokka, unu el la partoprenintoj de la fonda kunveno kaj la unua sekretario de la klubo. Nuntempe Liisa loĝas en Turku kaj estas nia honora membro same kiel Aulo Minell – ambaŭ estas fondaj membroj de la klubo.

Estis agrable aŭdi pri la komencaj jaroj. Kiel entuziasme la membroj agadis, aranĝis kursojn, eventojn kaj reklamis pri Esperanto sen multa mono. Krom Liisa kaj Aulo inter la aktivuloj estis Eino Lehkonen, Aarne Airo kaj Joh.Edv.

Leppäkoski, kiuj multflanke laboris por Esperanto instruante, varbante kaj tradukante.

La nunaj klubanoj ne plu estas tre aktivaj, sed tamen ni inter la kafumado kaj babilado decidis fondi en la komenco de la jaro 2004 studrondon, kiu ekstudos la esperantotradukon de la libro Seitsemän veljestä, verkita de Aleksis Kivi. Espereble ni tiel povos iom vigligi nian kluban agadon kaj eĉ iom pliriĉigi nian lingvoscion – kaj ankaŭ certe havi multajn amuzajn momentojn kun Sep fratoj.

La kvardekjara Esperantoklubo de Jyväskylä kore bonvenigas finnlandajn kaj eksterlandajn esperantistojn partopreni Vintrajn Tagojn de Esperanto-Asocio de Finnlando en Jyväskylä 13.-14.3.2004.

Seija Kettunen

Novaĵoj de la Turkua societo

Esperanto-societo en Turku havis la laŭstatutan jarkunvenon la 1-an de februaro 2004. Elektitaj funkciuloj estis jenaj: Prezidanto: Tiina Oittinen, vicprezidanto: Anna-Liisa Ali-Simola, sekretario: Leena Tiusanen; membroj: Paula Harju, Väinö Havu, Varpu Karo kaj Anja Launiai-nen, vicmembro kaj librotenisto: Veikko Tikkanen. Revizoroj: Ilpo Forsström kaj Leila Laine-oja, vicedrevizoroj: Jorma Ahomäki kaj Kerttu Kemppinen.

La societa vivo daŭras same vigle kiel lastjare, kaj la membrocirkulero *Informilo* informos pri la aranĝoj. La ĉiusemanaj renkontiĝoj estas la merkreda Diskuttrondo en la kafejo de Stockmann kaj la Esperanto-kurso marde en Aurala Civitana instituto. La Diskuttrondo estas nun oficiala ”opintokerho” (studklubo) akceptita de OK-opintokeskus. En la Aurala-kurso studas diligentaj gekursanoj, kiuj ĉiun semajnon lernos pli kaj pli de la internacia lingvo. Krome EST aranĝos kunvenojn pri la venontsomera kong-

reso en Ĉinio kaj muzeajn vizitojn, kiuj samtempe povas esti ekskursoj. Vizitantoj estas bonvenaj al ĉiuj aranĝoj. Kontakto la estraranoj por pliaj informoj.

EST-estraro

ELFI

Alvoko al jarkunveno

Jarkunveno de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj okazos sabate la 13an de marto 2004 je la 17a horo en la Kristana instituto de Jyväskylä, Sulkulantie 28. Estos traktataj la laŭstatutaj aferoj.

La estraro

Kutsu vuosikokoukseen

Suomen opettajien esperantoliitto ry:n vuosikokous pidetään 13. maaliskuuta klo 17 Jyväskylän kristillisellä opistolla, Sulkulantie 28. Sääntömääräiset asiat.

Johtokunta

FEJO babilas

Urbegtekniko

(Kurta baza kurso. Daŭro ĉ. 2 tagoj)

Ŝajni turiste ne estas en la modo – fakte, ĝi neniam estis moda. Preferinde, oni faru same kiel la lokuloj. En Novjorko, portu kurŝuojn; en Tokio, ne mobiltelefonu en la trajno. Kaj tiel plu. Tamen, ne indas okupiĝi pri la detaloj, antaŭ ol oni regas la bazan urbegteknikon. Ne temas pri kompleksaĵo, jen ĝi en tri simplaj paŝoj:

1) IRU CELKONSCIE. Ne hezitu. Ne rigardu ĉirkaŭen. Ne rigardu la mapon kiam vi estas ekstere kie lokuloj povus vidi vin. Eĉ se vi TUTE ne scias, kie vi estas, antaŭeniru rekte kaj pezpaŝe. Ne gravas se vi konas la vojon nur ĝis la venonta stratangulo, iru tien konscie. Tiel vi ne ŝajnos eksterulo, kaj povos iom post iom reekscii, kie vi vere estas.

2) DUM LA UNUAJ TAGOJ, NE PAROLU KUN LA LOKULOJ. Bedaŭrinde, ne sufiĉas iri celkonscie. Se vi ne iras ankaŭ rapide, la intervjuistoj (la ĝeneguloj en ĉiu urbega promenstrato) atingos vin, kaj vi devos respondi al demandoj pri viaj televidrigardaj kutimoj aŭ simile. En la plej plorinda kazo, oni ekscios ke vi parolas neniun vorton de la loka lingvo aŭ havas teruran akcenton. Alia ĝena grupo estas la senhorloĝuloj, kiuj frenezigos vin kun siaj "Kioma horo estas?" Baf! En urbegoj estas ja ĉie horloĝoj, en la vendejoj kaj kafejoj kaj sur preĝejaj muroj, kaj kiu ne TION sciias, estas mem vera turisto kaj ne meritas, ke vi – sukcesa ŝajnlokulo – parolu kun li. Iru do for, kaj ne rigardu malantaŭ vi. Vi ŝuldas al neni, ke vi vin haltu kaj malkovru vian superban taktikon.

3) TRAJNOJ, BUSOJ KAJ SIMILAJ estas regeblaj, same senpene kiel la stratoj. Por lerni la lokajn kutimojn, ne eniru la trajnon aŭ la buson unua. Lasu la lokulojn eniri antaŭ vi. Tiel vi povas konstati, ĉu eble en ĉi-tiu urbo la enirantoj bloku la pordon tiel, ke la elirantoj ne povas eliri (surprize kutima praktiko en la mondo!). Vi ankaŭ

vidos, ĉu en ĉi-tiu urbo oni sidiĝas je la fenestra, aŭ ĉu je la ireja flanko de malokupita benko – aŭ ĉu oni entute sidiĝas (eble ĉiuj nur restas starante ĉe la pordo, blokante la vojon de la en- KAJ elirdeziruloj). Lasu al vi tempon por observi, vi evitos erarojn.



Gratulon! Lerninte la bazajn lokajn strat- kaj busmanierojn, vi baldaŭ konstatos, ke oni supozas vin esti lokulo. Je ĉi-tiu punkto ne plu gravas, se vi ne perfekte regas la lokan lingvon: la iluzio ne plu disiĝos. Oni haltigos vin en la strato kaj petos vin klarigi la vojon al la fama trinkejo "1895 Okulistoj", aŭ volos ekscii, kie oni povas aĉeti orfiŝojn aŭ kafokuirilojn. Kia belega sukceso! Kaj se vi saĝe pasigis viajn vesperojn en la vizitata urbo studante ĝiajn Flavajn Paĝojn, ne estos iu problemo respondi al tiaj demandoj.

Do, neniam plu "Sinjoro aĉetu Rolekson", neniam plu "speciala prezo, sinjorino! Ekskluzive por vi!" Simple iru rapide kaj celkonscie, prenu la buson korekte – kaj la urbego estas via!

Liisa Viinanen

FEJO sportadas

FEJO daŭrigis la sportajn tradiciojn dum vintro. En Helsinko 1.11. la sportspeco estis halhokeo kaj teamdivido estis ordinaraj membroj kontraŭ subtenantaj membroj. La subtenuloj superis la bebojn per golnombroj 8-3. Se ni faros iam denove tian teamdividon, devos esti pripensata io kompenso por la nematureco. Eble la teamoj estu egalaj ne per nombro de ludantoj, sed per sumo de aĝoj.

Sekva sporto estis glaciopilko 7.2. en Rauma, la urbeto konata pro glacisporta forto. Teamoj nun estis Helsinko kontraŭ aliaj, pro kio la venkanta flanko estis ekde komenco memklara. La golnombroj por formale konkludigi la superecon de la provincurboj estis 8-2.

Mikko Mäkitalo

Lempiasioita – Am-aferoj

Udessa sarjassa fejolaiset kertovat lempiasioistaan. Koonnut: Katja Lampinen.



Paula Niinikorpi

Prefera loko

La loko, kiun mi tre multe ŝatas, estas parko kun malgranda rivero kaj du arkaj pontetoj. Ekzistas ankaŭ kabaneto kaj kelkaj arboj kaj arbustoj. Mi vizitis la parkon la unuan fojon kiel infano, sed post tio pasis kelkaj jaroj antaŭ mi denove vizitis la parkon. Sed mi ja memoris ĝin dum la tuta tempo kiel mirinde belan lokon. Nuntempe la parko estas silentejo por mi kaj loko, kie mi povas pensi pri aferoj.

IJK en Rusio

La Internacia Junulara Kongreso de tiu ĉi jaro estos 10.-17.7. en Rusio, apud urbo Kovrov, kiu situas 200 kilometroj oriente de Moskva. Ni ne tamen bezonos vojaĝi solaj tiom longe for, ĉar la rusoj organizos antaŭkongreson en Sankt-Peterburg 6.-9.7. kaj komunan trajnveturon de tie al IJK.

Eblus fari komunan vojaĝon el Finnlando al Sankt-Peterburg ekzemple bicikle. Tiukaze ni povus kolektiĝi en Helsinki 2.7. kaj bicikli la 400 kilometrojn al Sankt-Peterburg dum la kvar tagoj. Eblos laŭ neceso malrapidigi la tempokemon. Mi jam ricevis el rusa flanko helpeman respondon kaj eĉ provizoran promeson renkonti bicikle nin en iu loko inter landlimo kaj Sankt-Peterburg.

Mi estas jam sperta biciklanto pri eksterlandaj vojaĝoj, sed speciale mi bonvenigus akompanion, kiu parolas la rusan lingvon, kiun mi mem tute ne parolas. Do se interesas vin partopreni la veturon, kontaktu min plejeble baldaŭ por detaligi la planon kaj eble logi ankaŭ alilandajn partoprenantojn. Plia informo en retpoŝtlisto de FEJO aŭ ricevebla de mi.

Mikko Mäkitalo
makimik@hotmail.com
tel. 02 2373 848

Alvoko al jarkunveno de FEJO

Jarkunveno de Finnlanda Esperantista Junulara Organizo okazos sabate la 13an de marto 2004 je la 17a horo en la Kristana instituto de Jyväskylä, Sulkulantie 28. Estos traktataj la laŭstatutaj aferoj kaj ŝanĝo de la statuto.

La estraro

Kutsu vuosikokoukseen

Suomen Nuorten Esperantoliitto ry:n vuosikokous pidetään la 13. maaliskuuta klo 17 Jyväskylän kristillisellä opistolla, Sulkulantie 28. Käsitellään sääntömääräiset asiat ja sääntömuutos.

Hallitus

Muut lehdet

Osmo Bullerin nimitys

Helsingin Sanomat noteerasi Järjestöt-palstalla Osmo Bullerin nimeämisen Esperanton maailmanliiton pääjohtajaksi. Buller hoiti samaa tehtävää 1996-2001. Jutussa mainitaan, että maailmanliitto perustettiin 1908.

Esperantisti, trubaduuri ja kirjailija

Venäläisen Mihail Bronšteinin Suomen-kiertueesta kirjoitettiin **Salon Seudun Sanomissa** 29.1.2004 ja **Länsi-Suomessa**, raumalaisessa lehdessä 23.1.2004.

Salon Seudun Sanomissa kerrotaan Bronšteinin Kemiön vierailusta ja hänen esiintymisistään. Mihail on tehnyt levyjä ja kirjoittanut 14 kirjaa esperantoksi. Hän sanoo, että esperanto on tarpeeksi laaja sanomaan kaiken, mitä ihminen ajattelee, tuntee ja kokee. Hän oppi esperanton yli 40 vuotta sitten Ukrainassa ja on itsekin opettanut kieltä. Jutussa haastatellaan myös Anna Ritamäkeä, joka esitteli esperanton käyttöä nykymaailmassa. Hän kertoi esperanton syntymisestä ja puhumisesta sekä siitä, kuinka siitä tuli elävä kieli, vaikka siitä ei tullut maailmankieltä niin kuin alun perin ajateltiin. Jutussa kerrotaan Bronšteinin kiertueen reitistä.

Kainalojutussa kerrotaan esperanton harrastuksesta Suomessa sekä Anna Ritamäen ja Carola Antskogin työstä esperanton opetuksessa ja levityksessä. Anna arvioi, että kielen arvostus on kasvanut viimeisen kahdenkymmenen vuoden aikana. Lehdessä on myös faktalaatikko kielen perustamisesta ja esperanton kielisestä kirjallisuudesta, sekä käännetyistä alkuperäisistä.

Länsi-Suomessa Bronštein kertoo, kuinka esperanto oli Neuvostoliitossa 1960-luvulla keino luoda yhteyksiä muuhun maailmaan. Se oli yksi osa toisinajattelua. Lehti kertoo hänen käännös- ja kirjoitustyöstään esperanton sekä venäjän kielellä.

Bronštein itse kirjoittaa pääasiassa esperantoksi. Hän on tehnyt lauluja ja proosaa. Hänen ihannemaailmansa on moninainen ja monivärinen rauhan maailma.

Maailmankiertäjän, Juhani Vilkin kieli

Turun Sanomissa oli sivun juttu Juhani Vilkipästä ja hänen matkoistaan ja seikkailuistaan Australiassa, Etelä-Amerikassa ja Afrikassa. Esperanton hän opetteli, kun sai isältään alan oppikirjan.

Vilki sanoi, että esperantistien lehden avulla hän sai ympäri maailmaa kieltä harrastavien ihmisten osoitteita ja että siitä oli matkoilla iloa ja hyötyä. Esperantotuttujen avulla hän sai mm. matkoillaan töitä. Muuten artikkelissa kerrotaan Juhani Vilkin maailmanmatkoista.

Jukka Noponen



UEA-kotizoj 2004

Kiel ano de Esperanto-Asocio de Finnlando vi aŭtomate estas aligita membro de Universala-Esperanto-Asocio, sed se vi volas ĝui individuan membrecon en la monda asocio, jen la membro-kotizoj de UEA 2004 validaj por Finnlando. Membro sub 30 jaroj estas aŭtomate membro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

Membrokategorioj

MG – 9 EUR

MJ – 22 EUR

MA kaj MA(T) – 54 EUR

DMJ – 550 EUR

DM – 1350 EUR

MG – Individua membro, kiu ricevas nur la Gvidlibron tra la Esperanto-movado.

MJ – Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron.

MA – Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron kaj la revuon Esperanto.

MA(T) – Individua membro sub 30 jaroj, kiu ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto kaj revuojn de TEJO.

DMJ – Dumviva membro, kiu ricevas dumvive la Jarlibron.

DM – Dumviva membro, kiu ricevas dumvive la Jarlibron kaj la revuon Esperanto.

Subtenaj kategorioj

DP – 13500

PT – 66

DPT – 1650

SZ – 108

DP – Dumviva Patrono de UEA, kiu ricevas dumvive la Jarlibron kaj la revuon Esperanto.

PT – Patrono de TEJO, kiu ricevas la eldonaĵojn de TEJO.

DPT – Dumviva Patrono de TEJO, kiu ricevas dumvive la eldonaĵojn de TEJO.

SZ – Membro de Societo Zamenhof, kiu volas finance apogi Universalan Esperanto-Asocion.

Kotizojn en Finnlando peras la ĉefdelegito de UEA Heta Kesälä. Pagu la kotizon al la bankkonto 800029-19438647 kaj klare indiku la celon de la pago. Nova membro, speciale grava por TEJO-aĝaj membroj, ankaŭ prefere indiku la naskiĝtagon.

3 ▷ Por EAF-membroj la gazeto estas la plej konkreta tia servo, sed ni ne forgesu la renkontiĝojn, la lernooblecojn, la bibliotekon, la libromendajn servojn kaj multon plian.

Ni krome ne forgesu ke EAF havas financajn rimedojn kaj povas kiel asocio havigi tiajn pli facile ol individuo. La financaj rimedoj, eĉ se modestaj, faciligas agadon.



La nuna defio por la aktivuloj estas aranĝi bone la plenumon de la bazaj asociaj funkcioj kaj samtempe evoluigi novajn inspirajn agadojn en la ĝustaj kunteksto.

Tiuj bazaj asociaj funkcioj plejparte estas nevideblaj, kiam ili estas bone prizorgataj, videblaj nur kaze de fuŝoj. Ekzemple glate funkcianta membreregistro estas esenca por funkciigo de multo alia en la asocio, sed oni malofte rimarkas ĝin krom se subite ĝi ne estas ĝisdatigita.

Novan inspiran agadon, ni povas kunkrei, iom post iom, ankaŭ en tradiciaj kadroj. Ni devas trovi rimedojn subteni, home kaj laŭeble ankaŭ finance, homojn kun interesaj ideoj, tiel ke estu pli facile realigi pozitivajn viziojn.

Kun bondeziro al la membroj, ja sen membroj asocio ne eblas, salutas via prezidanto

Anna Margareta

Eble la muziko – diris Setälä

Novajn kutimojn lernis la lernejoj knaboj en tagoj de la "daŭriga milito". Tiuj de superaj klasoj diligente studis la germanan lingvon, almenaŭ por privata uzo. Strange tio neniel rilatis kun sukceso de la lingvaj studoj. Sed tre flue ili demandis "...können Sie möglicherweise einige Zigaretten verkaufen..." La porciumo de multaj varoj, inter aliaj tiu de tabako, kaŭzis, ke oni povis bele gajni per cigaredoj de la germanaj soldatoj.

La finna armeo rapide reakiris la terenon perditan en la antaŭa milito. La patro ne havis hejmpermesojn, sed sendis leterojn, el kiuj tamen ne estis eble diveni lian restadejon. Tamen fartis bone. En la komenco de oktobro alvenis poŝtkarto. Ĝin sendis juna soldato, kies tasko estis gvidi kaj prizorgi la hundon Lukki. Ambaŭ estis en bona stato.

Esperanto tiam restis iel flanka afero. En la urba biblioteko troviĝis kelkaj libroj. Kun peno Arvikolo legis libron pri franca kortego, sed manko de taŭgaj vortaroj ĝin faris ne tre ĝuinda.

En la fino de oktobro alia poŝtkarto. Blanketo. Oficiala. Oni informis, ke detruigis la biciklo. Kontraŭ la karto oni rekompensas 500.- Kvincent markojn por biciklo, kiu nova kostis dumil! Nu, milito ja havas siajn kostojn, eĉ por privataj uloj.

Varoj ĉiam pli malaperis en la butikoj. La milito komenciĝis en vere malfavora tempo, tre multaj viroj forestis en la rikoltaj tagoj. Ankaŭ la importo de eksterlandaj varoj ĉiam pli malfaciliĝis. En novembro oni legis en taga ĵurnalo mortavizon de juna subserĝento, kun precize sama nomo kiel la prizorganto de Lukki. Kaj tiatempe abundis mortavizoj. Kun timo la tuta familio atendis eblan oficialan mesaĝon. Jes, venis letero, en kiu estis sciigita, ke la hundo mortis ie, en la fronto. Ankaŭ por li oni proponis kvincent markojn. Monon por amiko, kies prezon oni ne povis fiksi aŭ taksi! Tiun monon

Arvikolo neniam kolektis. Por la patrujo, jes, sed ne kontraŭ mono, donis sian vivon la brava flavpelta fokhundo, el raso, kiuj jam estingiĝis.



En la komenco de 50-aj jaroj, iun belan printempan vesperon, Vilho Setälä kaj Arvikolo, sidante sur roko en la korto de la domo ĉe Onnentie, diskutis la proksimajn rilatojn inter homo kaj besto. Arvikolo rakontis kiel lin afliktis la perdo de Lukki, kiel la tiam proksima Kristnasko fariĝis pura turmento, kiel li dum monatoj sola promenis en lokoj, kie li antaŭe ludis kun la hundo.

Vilho Setälä diris, ke estas du aferoj, kiujn li ne bone komprenas, kaj unu estas la tre intima homo-besto rilato. Kaj la alia? Jes, eble la muziko... Strange, ĉar tiam loĝis en la mastrumado de Setälä tre ĉarma spaniolo, nomata Pontus.

Arvikolo

juna amiko

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO
POR LERNEJANOJ KAJ
KOMENCANTOJ

*helpilo por instruistoj
instigilo por lernantoj
movilo por la movado*

Redaktoro Géza Kurucz.
Vic-redaktoro Stefan MacGill.
Lingva revizianto Baldur Ragnarsson.
Eldonas Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj.

**Plentarifa abono 12 eur
por kvar 28-paĝaj numeroj jare.**

Abonu de Sylvia Hämäläinen
Teivaalantie 85, 33400 TAMPERE
<veli.hamalainen@kolumbus.fi>
konto 800028-10300680

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ◆ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ◆ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispohantie 298, 74100 Iisalmi
- ◆ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609
☎ kari.kettunen@pp1.inet.fi
- ◆ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti.
☎ martti.pennanen@phnet.fi
- ◆ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ◆ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla
☎ matti.wallius@pp.inet.fi
- ◆ Esperantoseura Antaäen ry. / Esperantosocieto Antaäen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstie 37, 37500 Lempäälä,
☎ lauri.liukkonen@jippii.fi)
- ◆ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ◆ Suomen opettajien esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ◆ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- ◆ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki.
☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2003 on 18 e sisältäen Esperantoleh-

den. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Mietinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2004**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
2	1.3	15.3	1.4
3	1.5	15.5	1.6
4	1.7	15.7	1.8
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ◆ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki



FEJO-anoj en malnova urbo de Rauma.

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuun alussa. Jutut 15.3.2004 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en la komenco de aprilo. Artikoloj ĝis 15.3.2004 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <ea^flehti@esperanto.fi>.

Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2004